



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 5-a de Junio 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi.

*La Estraro deziras rapidan kaj plenan resaniĝon al Matilda, al la patrino de Eldad, kaj al la patro de Eran.*

*Protokolo de la antaŭa kunsido (8-a de Majo 2017) – aperas publike en la retejo - <http://esperanto.org.il/estraro.html> , kaj estis ankaŭ dissendita al la estraranoj. – **aprobita***

### Raportoj

- a) Amri sendis ĉ. 150 ekz. de Israela E-isto, 90 eksterlande kaj la ceteron enlande. Al la eksterlandaj abonantoj li aldonis leteron kun atentigo pri la renovigo de la abono kaj pri la ebleco aĉeti la Memorlibron de Josi kun triona rabato. Ne estis sendita al membroj kaj abonintoj kiuj ne pagis post 2014.
- b) Ondo de Esperanto: aperis tutpaĝa artikolo pri la Israela kongreso en la maja n-ro. 8-paĝa artikolo de Amri pri astrobiologio aperis en la junia n-ro.
- c) Michal prizorgis programojn ĝis 31/7. La 10/7-an parolos Eti Lachovitzky.

### 1. Landa Kunveno - la 26-an de junio, 2017 (Jehoŝua)

- a) Amri interkonsentis kun Tal Babitzky pri tuttempa akompanado por 500 NIS (duono de lia kutima tarifo). Tio ankaŭ solvos la problemon de piano. *Voĉdono: **aprobita unuanime**.*
- b) Arta programo: Ŝoŝia, Doron, publika kantado kun akompano de Tal Babitzky (eble israelaj kantoj en E-o el la KD-oj) [intertempe aliĝis ankaŭ Enrika]
- c) Hebrea prelego: Amir Naor, pri sia nova verkista portalo. E-prelego: letero de Mikaelo Bronŝtein pri la IK. Legos: kiu? (Matilda esploras kaj petos). Akompane Amri projekcios fotojn de la IK en Aŝkelono.
- ĉ) Jehoŝua memorigos pri kotizoj.

### 2. Estontaj Israelaj Kongresoj (Amri)

- a) En 2018: Junulargastejo en Akko: kiu organizos kaj kontaktos la gastejon? Ĉu Nava Bilitzki? – ni devas jam rezervi! Estas bezonata ĉef-organizanto anstataŭ Amri, kiu deziras koncentriĝi pri 2019. Pri ekskursoj dum la 19-a IK kaj pri la PK al Jerusalemo, la Sudo kaj Petra tamen respondecos Amri. Jehoŝua kompilos la aliĝilon kaj komencos la kontaktojn kun la gastejo en Akko, ĉar Nava momente ne povas. [post la kunsido evidentiĝis ke en la antaŭe decidita dato jam **ne** restis sufiĉe da ĉambroj, do per telefona interkonsultiĝo estis decidite malfruigi je unu semajno, al 3-5 de majo 2018].

2/...



b) 20-a IK en 2019: Eilat kun MONA-Kunveno en Akaba: Amri verkis afiŝon. Informoj jam aperas en la retejoj de ELI kaj de MONA.

c) Kiu respondecu pri MONA kaj KAEM, se Eran ne faras? -Eran diris ke lastatempe li estis okupita pro la patro, kaj krome lia retadreso ŝanĝiĝis, la nova estas eran2000@gmail.com. La antaŭa, yahoo-adreso plufunkcias sed li apenaŭ kontrolas ĝin. Tio klarigas la plendojn de MONA (Renato) kaj KAEM, ke nia komisiito ne reagis al mesaĝoj. Eran aprobas sciigi al ili sian ĝisdatan retadreson.

### **3. Nova reklam-kampanjo** (Amri, 5 min)

Sekve de la aprila reklamkampanjo en Facebook ĉu ni faru novan, specife pri la Jerusalema Libro-Foiro, celita al Jerusalemo kaj Tel-Avivo? La prezo: 110 NIS por 7 tagoj.

*Voĉdono: unuanime akceptita!*

### **4. Jerusalema Libro-Foiro 11-15/6** (Amri)

a) Amri alportos la librojn kaj aranĝos ilin dimanĉe. Oficiala inaŭguro: dimanĉe je la 17-a en YMCA kun la urbestro.

b) Nia budo estas n-ro 2, apud Steimatzky. Horaro: de la 11-a ĝis la 23-a ĉiutage (krom dimanĉe: de 18 ĝis 23).

c) Deĵorado en la budo: Amri ĉiutage, aldone 14/6 - Jehoŝua kaj Tali, 12/6 - Cvi, 11,13-15/6 - Avigail [fine Cvi ne povis la 12-an kaj Avigail ne la 13-an]

ĉ) Anstataŭ prelego: publika debato pri E-o kaj la ideo de Internacia Lingvo, kun Doron, Tali kaj Amri. La 14/6-an je la 19:00. Ĝi aperas en la oficiala programo. Amri klopodos inviti prof.-inon Ruth Gabison.

**5. Inaŭguro de la E-tabulo** en la preĝejo Patro Nia (Oliva Monto) okazos la 14/6 je 16:00, venos eksterlandaj gastoj. Invito al la inaŭguro kaj al la debato estis sendita al ĉiuj membroj per ELI-listo.

### **6. Hipoteko por nova klubejo** (Ŝlomo)

El 30 banko-filioj kontaktitaj de Ŝlomo la plimulto ne reagis, au diris ke ne ekzistas hipotekaj departementoj. Nur unu filio de Bank Hapoalim konsentis plutrakti, sed postulas amason da dokumentoj. Ni bezonas 500 mil siklojn. Ŝlomo daŭrigos serĉi kaj esplori. Amri sugestis provi ankaŭ aliajn bankojn, krom Leumi kaj Hapoalim.

**7. Pola Instituto** (kultura, en Tel Avivo) - proponas organizi ekspozicion pri la vivo de Zamenhof. Avigail, la respondeculino, klarigis al Amri ke temas pri preta ekspozicio preperita de la ekstera ministerio de Pollando kunlabore kun Unesko. [Amri renkontis ŝin en la Libro-Foiro, kaj interkonsentis, ke ŝi serĉu taŭgan gastejon, eventuale Bet Hatfucot].



### **8. Grupa mendo de la nova libro pri E-o de Ester Ŝor**

Jagil mendis 8 ekzemplerojn kaj jam ricevis. La reta prezo - 100 NIS (inkl. sendokostoj). Ŝlomo repagu al li lunde 800 NIS. Nur tri mendis (Jehoŝua, Ŝaul Ĥasid, Ora Maŝiaĥ), ili pagu al ELI. La ceterajn 5 ekz. ni provu vendi en la Foiro (por 120 NIS). Ankaŭ 4 ekzemplerojn de la Eta Princo en E-o. [ĉiuj menditaj libroj estis venditaj, krom unu ekzemplero de Ŝor]

### **9. Dratverejo -38 תמא (Eran)**

Advokata raporto / resumo daŭre ne estis sendita, - estas decidite ne investi por plibonigo. Debato pri la riskoj de nia subskribo (=konsento): du kondiĉojn ni devos enigi / trakti.  
– ke ni rajtu uzi ĝin kiel prunto-garantion ĝis 500 mil NIS;  
– kiom ni devos pagi, se la luantoj ne volos eliri. Ni insistu pri tiu punkto!

**La venonta kunsido:** lunde, la 3-an de Julio 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi